

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



Sonorilo

55-a jaro - n° 3
Junio - Julio 1963

Demandu provveturon per
la nova

Ford Anglia

LA PLEJ BRILA EN SIA KATEGORIO



rekta distribuanto por Brugge kaj
ĉirkaŭaĵoj

GARAGE CANADA

GULDEN VLIESLAAN 68 BRUGGE

TEL. 34611

Sonorilo

oficiala dumonata bulteno de B.E.F.

REDAKCIO : jaumotte maurice
roose fernand, sint-klaradreef 59, BRUGGE TEL. (050) 319.81
maertens grégoire
poupeye charles

KUNLABORANTOJ AL REGULAJ RUBRIKOJ :

DR. POL DENOËL
BRUNO DENOËL
ISERENTANT ROGER
DE CUYPER GEORGES
DE MARRÉ LUC

ADMINISTRADO : TERRYN J. RAAPSTRAAT, 72 GENT



ASOCIO SEN PROFITA CELO

SIDEJO & PREZIDANTEJO
DE BRUYNLAAN 44, WILRIJK TEL. (03) 377758

HONORA PREZIDANTO

kempeneers paul

HONORA VICPREZIDANTO

sielens henri

ĜENERALA PREZIDANTOJ

jaumotte maurice

PREZIDANTOJ

DEBROUWERE GERARD, MAGDLENA STRAAT 29 KORTRIJK
DR. DENOËL POL, 10 RUE V. RASKIN LIÈGE

UNUA VICPREZIDANTO

roose fernand

VICPREZIDANTINO ŝAKESTRINO POR KONGRESOJ

plyson j. 23, PLACO E. FLAGAY, BRUSALO 5 P.K. 236804

VICPREZIDANTO ŝAKESTRO PRI TEĤNIKAJ RIMEDOJ

VERSTRACHTÉ JULES, SINT BERNARDSE STEENWEG 1078 HOBOKEN

ĜENERALA SEKRETARIO

DE MARRÉ LUC, GROENENDAALLAAN 232. ANTWERPEN TEL. (03) 411912

SEKRETARIO POR LA FLANDRALINGVA REGIONO

MAERTENS GRÉGOIRE, PRINS LEOPOLDSTR 51, ST-KRUIS TEL. (050) 34935

SEKRETARIO POR LA FRANCLINGVA REGIONO

DE CUYPER GEORGES, 66, RUE DE DORLODOT, MONCEAU SUR SAMBRE

KASISTINO

TERRYN JULIETTE, RAAPSTRAAT 72, GENT

ĈEFDELEGITO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

FR. SCHELLEKENS, FRANS HENS STRAAT, 44, ANTWERPEN 2
P.K. 9051.25

poŝtkonto de B.E.F. : 1634.34 RAAPSTRAAT, 72, GENT

LASTMOMENTAJ NOVAĴOJ

Inaŭguro de D-ro Zamenhof-avenuo en Anderlecht

Sabaton, la 15an de junio, posttagmeze, nia ĝenerala prezidanto rendevuis kun multaj administrantoj de BEF: D-ro P. Denoël, prezidanto; F-ino J. Terryn, kasistino; S-ro Fr. Schellekens, ĉefdelegito de UEA; S-ro Ch. Poupeye, estrarano; S-roj R. Jacobs kaj R. Paulus, grupprezidantoj; Pastro J. de Maeyer, S-ino A. Meurrens, F-inoj Orsolini kaj M. T. Henquinez; S-roj J. Oleffe kaj J. Kocune; kaj kun ducent aliaj esperantistoj, membroj de BEF, de SAT, de la Naturamikoj, ktp., ĉe la eniro de la nova D-ro Zamenhof-avenuo, en Anderlecht, tutapude de la ŝoseo de Mons.

Ili estis bonvenigataj tie de la deputito-urbestro Bracops, kiu alparolis la ĉeestantojn en tri lingvoj; kiel ankaŭ faris S-ro M. Jaumotte en sia gratul- kaj dankrespondo al la urbestro kaj ĉeestantaj geskabenoj.

Krome parolis S-ro Maurice Van Aelst, reprezentanto de la franclingvaj laboristoj esperantistaj; kaj ankaŭ, mallonge kaj nur en esperanto, ses diversnaciaj samideanoj por demonstracil, — kiel diris la urbestro —, la bel- kaj samsonecon de la lingvo, elparolita de homoj venintaj el diversaj landoj kaj apartenantaj al diversaj profesioj.

S-ro M. Jaumotte tradukis tiujn paroladetojn nacilingven kaj, — je persona peto de S-ro Bracops —, ankaŭ klarigis la specialan situacion rilate al Esperanto de la du lastaj parolintoj, la geedzoj Fighiera-Sikorska.

Sekvis la ceremonio de la inaŭguro: tondo de rubando kaj promonado tra la nova avenuo, bele ornamita per flagoj.

Sekvante, oni tiam sin direktis al la Erasmo-domo, kie okazis akcepto kun ĉampanvino kaj dum kiu la urbestro kantigis kaj mem kunkantis «La Espero» pri kio S-ro M. Jaumotte pecciale atentigis kaj pro kio li dankis.

Unu plia Ekspozicio

Je la sama tago kaj momento, okazis en Borgerhout, la malfermo de unu plia ekspozicio, organizita de la Antverpena EKI, tiun ĉi fojon en Borgerhout, en la bela kaj granda komunuma salonego de la Turnhoutse baan, kaj kiu ĝuis, dum la du tagoj de la semajnfino, gravan vizitadan sukceson.

En foresto de la prezidanto S-ro M. Jaumotte, kiu iris en Anderlecht, estis S-ro J. Verslraeten, sekretario de EKI, kiu bonvenigis invititojn kaj journalistojn.

EUROPA FERIO-SEMAJNO EN SVISLANDO

(1-7 sept. 1963)

Por la kvina fojo la Svisa Asocio de Esperanto-fervojistoj organizos internacian ferio-semajnon por esperantistoj kaj geamikoj en la restadejo Volksbildungsheim OBERBALMBERG (SO) meze de ĉarmaj Jurasaj paŝtejoj. La komisiita organizanto aranĝas ĉion je sufiĉe modera prezo, se oni konsideras ke 4 tuttagaj ekskursoj kaj ĉiutage kompleta tagmanĝo estas enkalkulitaj, nome nur (po persono): sfr. 133,— inkluzive pensio kaj komuna dormejo.

Limtago por la aligoj: 15a de julio 1963.

Adreso: Sv. Asocio de Esj.-Fervojistoj, VIII 44 715 Zürich.

RABATO POR ESPERANTISTOJ

Kongreso ne senegala, sed plej varia

Pro la varmeco, kiu tiam regis dum la tri Kongrestagoj kaj ankaŭ pro la neantaŭvidita granda nombro de partoprenantoj, la UNUA Beneluxa Kongreso, vere kaj plene, meritis la titolon de « senegala », en la senco de Senegal'a kaj de sen-egala.

La Jubilea Kongreso, — dek jarojn poste, — ĝuis same belan veteron, sed eta, dolĉa venteto daŭre mildigis la temperaturon, tiel ke niaj kongresanoj povis, — pli bone ol antaŭ dek jaroj —, « ĝuadi » la diversajn aranĝojn.

Se do la unua meritis la ĉi supran titolon, estas nekontesteble, ke la nuna, same plene, meritas tiun de « plej varia ».

Eĉ tiuj, kiuj havas jam malantaŭ si longan vicon de kongresoj, verŝajne malfacile memoros Kongreson, en kiu L.K.K. prezentis pli riĉe varian programon, ol tiun ĉi jaron...

Tio evidentiĝos baldaŭ el la preparolo de la diversaj eroj. Sed antaŭe, ni volas kompletigi, per mallonga cito, la liston de la Kongresanoj, aperinta en la Kongreslibro kiu belete aspektis kaj enhavis vere multajn interesajn detalojn kaj informojn:

- 158 Faes, Aug., Antverpeno
- 159 Faes, Lucette (S-ino), Antverpeno
- 160 Vercammen Leo, Mehleno
- 161 Jaumotte, Félicie (S-ino), Antverpeno
- 162 Gyssens, Roger, Antverpeno
- 163 De Vleeshouwer, Wijchmaal
- 164 Neumann, H.D., Wiesbaden (Germ.)
- 165 Galle, Roland, Solingenwald (Germ.)
- 166 Roose, Fern., Bruĝo
- 167 Renart, Mercedes (F-ino), Lille (Franc.)
- 168 Van der Zijp, L., Duffel

La Kongresejo

Ni diru, ĉekomence de tiu ĉi raporto, ke ĉiuj aranĝoj okazis en unu sama salonego, en la vera vivoplana centro de la urbo, je nur kelkaj dekmetroj de la Centra Stacidomo: Breydelstraat, 15.

La L.K.K. efektive luis por la Kongrestagoj la tutan unuan etaĝon de granda konstruaĵo kun fest — kaj teatra — salonoj kaj kiun oni atingis per speciala enirejo, ĉe kiu estis klare anoncita: «ZAMENHOF-salonoj» - Jubilea Beneluxa Esperanto-Kongreso».

Suprenirinte la ŝtuparon, oni enirante tuj rimarkis longan vicon de oficejetoj, klare indikitaj: loĝado, informoj, dokumentoj, butiko, poŝtoŝeĵo.

Je la unua, — la loĝiga oficejo, — sidis S-ro F. Volders, la prezidanto de la L.K.K., kiu prenis sur sin respondi al multaj demandoj kaj al kelkaj plendetoj rilate al la loĝado... cetere malfacile eviteblaj en tiaj pentekostaj tagoj, kiam ĉiuj hoteloj estas plenplenaj.

Flanke de S-ro Volders, sidis liaj rektaj helpantoj, la sekretario kaj kasisto de la L.K.K., s-roj J. Verstraeten kaj R. Balleux, kiuj donis ĉiujn klarigojn kaj findecidis ĉiujn problemojn ekestantajn en daŭra kontakto kun S-ro M. Jaumotte, ĝenerala prezidanto de B.E.F., kiu ĉion superrigardis kaj ĉie helpis kie ŝajnis dezirinde.

LA LOKA KONGRES KOMITATO

| | |
|-------------------------------|--------------------------------|
| S-ro Maurice Jaumotte | ĝenerala prezidanto de B.E.F. |
| S-ro Luc De Marré | ĝenerala sekretario de B.E.F. |
| Asociaj Rerezentatoj : | |
| S-ro H.M. Schippers | prezidanto de L.E.E.N. |
| Efektivaj membroj : | |
| S-ro Henri Sielens | honora vicprezidanto de B.E.F. |
| S-ro Fernand Volders | prezidanto |
| S-ro Remy Van Eynde | vicprezidanto |
| S-ro Jos. Lernout | vicprezidanto |
| S-ro Jules Verstraeten | sekretario |
| S-ro René Balleux | kasisto |
| S-ro Raf Segers | loĝiga servo |
| S-ro François Schellekens | fest-organizanto |
| S-ro Roger Jaumotte | gazetara sekretario |
| S-ro Ivo Durwael | junularaj aferoj |
| S-ro Rik De Roover | membro |
| S-ro R. De Schepper | membro |
| S-ro Jozef Montmirail | membro |
| Konsilantoj : | |

Trian oficejon prizorgis S-inoj M. Jaumotte kaj R. Balleux, kiuj ĉiam kaj daŭre helpas siajn edzojn ĉe ĉiuj iliaj penadoj, ĉu temas pri kongreso, ekspozicio aŭ kio ajn organizita de la loka grupo !... Rapide, ĉiu ricevis el iliaj manoj siajn dokumentojn, kongreskarton kaj diverskoloran kuponaron, plej zorge preparitan por eviti poste malkonsentojn kaj malfacilaĵojn.

Vigla vendistino en la « Butiko » estis S-ino G. Debacker, helpita, por la stampitaj kartoĵoj, de S-ino L. Merckx, dum la tutsabata tago; kaj de kelkaj pliaj ulinoj, ankaŭ dum la dimanĉaj deĵorhoroj.

Kaj finfine, en speciale de la « Administracio de la Poŝtoj » alportita kaj lumigebla « dekorajo », funkciis « oficiala poŝtoŝtelo » kun speciala stampilo, kaj kiu prizorgis tri oficistojn, inter kiuj unu, S-ro Cautart, estas de ĉiuj jam konata, kiel bona esperantisto.

Inaŭguro de la Ekspozicio

Jam antaŭ la dektria horo, kiam malfermiĝis la oficejoj, kelkaj kongresanoj estis surloke. Kaj je la tria, kiam S-ro M. Jaumotte alvokis ĉiujn por la inaŭguro de la Ekspozicio, multaj dekoj da kongresanoj jam estis alvenintaj.

S-ro Jaumotte klarigis la celon de tiu Ekspozicio, kiu apartenas al la Antverpena Grupo « La Verda Stelo » kaj kiun tiu grupo bonvole metas je la dispono de ĉiuj grupoj, kiuj deziras fari propagandon en sia loko.

Li petis S-ron Fr. Schellekens, kiu, kun S-ro Verstraeten estas la realiginto de tiu ĉi renovigita ekspozicia materialo, montri la diapozitivojn kaj aŭdigi la 10-minutan akompanantan tekston, kiuj kune donas al ne-esperantista publiko klaran ideon pri la problemoj de internacia lingvo kaj pri nia movado.

Antverpeno prezentas sin

Je la 15, 40a, estis la vico al S-ro R. Van Eynde, vicprezidanto de la L.K.K., prezenti al la publiko filmon de la antverpena « Komisio pri Publika Helpado ».

Tiu ĉi kolorigita filmo, kiun la grupo « La Verda Stelo » tradukigis en Esperanto, montris ĉion, kio estas farita por la orfoj, la forlasitaj kaj malfeliĉaj infanoj de la aglomeraĵo. Estis bela kaj interesa filmo, kiun ĉiuj cetere tre atente rigardis kaj aŭskultis.

Oficiala Malferma Kunsido

Belga Esperanto-Federacio havis tiam kaj estraran kaj administrantan kunsidojn, pri kiuj oni raportos aparte kaj, — inter kiuj du, — okazis, je la 16,30 a h., la Oficiala Malferma Kunsido.

Sur la podio, kaj flanke de granda busto de D-ro Zamenhof, sidis ĉe longa tablo kun verda tapiŝo: la prezidantoj de la du naciaj kunorganizantaj asocioj S-roj M. Jaumotte kaj M.H. Schippers; la prezidanto de la L.K.K., S-ro F. Volders; la prezidantoj de BEF, S-roj G. Debrouwere kaj D-ro Denoël; la sekretario kaj kasisto de la L.K.K. S-roj J. Verstraeten kaj Balleux, kaj S-ro F. Roose, unua vicprezidanto de BEF.

Ĉe la pianoforto, F-ino Cl. Peeters ludis « La Espero »'n, kunkantitan de ĉiuj.

S-ro F. Volders, nome de la L.K.K., bonvenigis ĉiujn; S-ro M.H. Schippers salutis la kongresanojn nome de la nederlandanoj, kaj S-ro M. Jaumotte konkludis per bondeziroj al ĉiuj por tri belaj tagoj, kune pasigotaj.

Li legis telegramojn kaj leterojn ensenditajn de D-ro P. Kempe-neers, honora prezidanto de B.E.F. ; de F-ino Marianne Vermaas, direktorino de U.E.A., nunmomente en Svedujo ; de S-ro H. Sielens, honora vicprezidanto de BEF ; de S-ro Teo Jung, aliĝinta sed malhelpita ; de S-ro Iserentant, direktoro de la belga eldonejo « Sonorilo » ; de du hispanaj samideanoj Ramon Molera, sekretario de la L.K.K. por la hispana Kongreso en Barcelona, kaj L. Puig, el Sabadell, kaj « last not least », de F-ino Stella De Weerd, mem kongresanino, sed kiu deziris ankaŭ alporti la saluton de la Asocio de Laboristaj Esperantistoj « FLE », grupo Grand-Antverpeno.

Fine S-ro F. Volders donis ankoraŭ la parolvicon al S-roj Cur-nelle kaj Galle, kiuj alportis la saluton de la francaj kaj germanaj esperantistoj.

Komuna Vespermanĝo

Restis tiam al la Kongresanoj iom da tempo, ĉu por malgranda promenado, ĉu por kart-skribado. Kaj, je la 19a horo, la plimulto, el la partoprenantoj rekuniĝis ĉe manĝotabloj por la sabata vespermanĝo. Pli ol sepdek havis tiel agrablan okazon por interkonatiĝi.

Kultura kaj Amuza Vespero

S-roj Montmirail kaj Schellekens prizorgis, je la 20a h., la unuajn programerojn : la prezenton de bela kolorigita filmo, kun esperanto-teksto, pri « Antverpeno », disponigita de la Turisma Oficejo ; kaj de serio de diapozitivaj, rilatantaj al la fama pentraĵo de Brueghel, el la Muzeo de Bruselo : « La Popolkalkulado de Bethleem ». S-roj M. Jaumotte kaj Schellekens donis, per sonbendo, ĉiujn klarigojn pri pentristo kaj pentraĵo.

Inter ambaŭ, estis enŝovita kantnumero : Tenoro Lode De Coninck, akompanata ĉe la pianoforto de S-ro J. Spanoghe, aŭdigis la esperanto-tradukon de S-ro H. Vermuyten, de la « Kanto de Eŭropo » de Theo Vonck, kies tekstoj en aliaj lingvoj jam estas eldonitaj surdiske.

La dua parto de la programo konsistis el deklamado de tri poeziaĵoj, plej lerte kaj sentplene prezentitaj de S-ro H.M. Schippers kaj el « kviso », gvidita de li, inter du kvaroj, unu nederlando, unu belga. Ĉiuj devis « diveni » la veran signifon de malfacilaj kaj maloftaj vortoj.... Iĝis « België 3 — Holland 2 », kiel ni diras pri futbalo.

Kaj fine la junularo prezentis tutan serion de malgrandaj skeĉoj, amuzaj kaj artaj, kiujn prizorgis S-ro R. Van Humbeeck, kiu prezentis ilin kaj ankaŭ findankis siajn kunlaborantojn ; F-inoj G. Leibovitche kaj I. De Kort ; S-roj I. Durwael, Fr. Schellekens kaj Paul Joosen.



Onidiroj pri la distra
kongresa programo :

Post ĝenerala peto nun sekvos
ankaŭ la murdigo de la aŭtoro !

Ilin ĉiujn S-ro M. Jaumotte konklude dankis, same cetere kiel ĉiujn aliajn, kiuj iele helpis al la sukcesigo de tiu ĉi programo, kiu daŭris de la 8a ĝis la 23,30a !

La dimanĉa tago

Religia Di-servo

Por la katolikaj kongresanoj estis aranĝita Sankta Meso en la kapelo de la « St. Jan Berchmans College ».... Kaj neniam antaŭe tiu aranĝo estis tiel trafa, kiel nun : L.P.M. J. De Maeyer, kiu legis la Meson, estas unu el niaj plej bonaj predikantoj. Li estis helpata de juna samideano kaj kongresano Arthur Vleugels. Kaj krome S-ro Luc De Marré oficis kiel helpanto de la Mes-oferanto, legante la Evangelion kaj Epitron, laŭ la nuna, nova kutimo : en la « popollingvo ».... do en la nuna okazo en « Esperanto ».

Oficiala Fotografado

De la Meirplaco, la katolikaj kongresanoj sin direktis al la Reĝa Flandra Operdomo. Kaj tuj post ilia alveno, okazis la oficiala fotografado. Kaj multaj jam tuj mendis tiun belan memoraĵon pri Kongreso jam bele sukcesanta.

Vizito al la Rubensdomo

Dum plena horo, S-ro Maur. Jaumotte gvidis centon da kongresanoj tra la belega loĝdomo de Rubens. En enkonduka paroladeto sur la granda korto, li klarigis la ĉefajn sciindaĵojn pri Rubens, pri lia familio, liaj edzinoj Isabela Brant kaj Helena Fourment, pri lia vivo ĝenerale, kaj pri lia vivo en tiu ĉi domo, en kiu li mortis.... Tiujn klarigojn, li daŭrigis, ankaŭ en la diversaj salonoj kaj ĉambretoj de tiu vasta domo.

Al la Urbdomo

Je la 11,30a la kongresanoj alvenis, antaŭ la Urbdomo, kiun ĉiuj havis la okazon detale kaj plenkone viziti, dank'al la multaj klarigoj, kiujn, unufoje pli, donis la ĝenerale prezidanto de B.E.F.

Je la 12a, ĉiuj kunestis en la granda Leys-salono, kie eniris la Urbestra Moŝto S-ro Lode Craeybeckx, akompanata de konsilanto-esperantisto S-ro Clymans.

Kiel prezidanto de la Kongreso, S-ro M. Jaumotte prezentis la kongresanaron. Li dankis la urbestron pro ĉio, kion li jam faris por Esperanto kaj pro la hodiaŭa akcepto. Li transdonis al la Urba Administracio du sonbendojn, destinitajn por la Muzeo Plantin-Moretus.

La Urbestro respondis plej afable; memorigis ke li, kiel ĵurnalistoj, jam defendis la ideon de lingvo internacia, kiel Esperanto; ke li, en sia vivo de urbestro kaj deputito, en diversaj okazoj, ankaŭ rekomendis la uzon de esperanto; kaj li fine, ankaŭ en franca lingvo, salutis niajn valonajn kaj francajn amikojn. Li deziris al nia Kongreso plej grandan sukceson.

Kaj, dum oni trinkis la honorvinon, S-ro M. Jaumotte prezentis al la Urbestro ĉiujn, kiuj havas, ĉu en la Kongreskomitato, ĉu en la du Asocioj, ĉu en la lokaj grupoj, iun gvidan rolon.

Kaj, je la 12h45a, finiĝis tiu bela kaj memorinda akcepto.



Dum la akcepto en la Urbdomo: tute dekstre: la Urbestro dum li alparolas la kongresanojn. Je la alia flanko de la tablo: de dekstre: estraranojn de la du Asocioj kaj de la L.K.K.; S-roj Debrouwere, Balleux, Schippers, Jaumotte, Volders, Verstraeten kaj Van Eynde.

(Foto kaj kliso « Volksgazet »)

En Plantin-Moretus-muzeo

Kaj, jam unu horon poste, la nelacigebla prezidanto de BEF atendis la Kongresanojn ĉe la enirejo de la « Plantin-Moretus-muzeo ». Multaj je tiu momento ankoraŭ for-estis.

S-ro M. Jaumotte tuj aranĝis la sonbendojn, kiuj estis enmetataj en du aparatojn: disaŭdigilojn, kiujn oni povas kunporti en la Muzeon. Li foriris mem kun unua grupo, dum li lasis la zorgon gvidi duan al S-ro Balleux.

Kaj dum pli ol unu horo, la voĉo de Kristoforo Plantin, — en kiu kelkaj pensis trovi iun similecon kun tiu de unu el niaj gvidantoj —, rakontis pri sia vivo en la Plantin-domo, pri la vivo de liaj posteuloj, la Moretusoj, kaj pri ĉio, kio estas kunigita en tiu tre tipa kaj bela muzeo.

Kaj jam estis tempo por iri al la Verda Placo, kie estis okazonta:

Balon-ralio

Jam antaŭ la fiksita horo de 15,30a h., granda aŭtomobilo ekalvenis sur la Groenplaats.... En ĝi: 250 balonoj kun la vorto « **ESPERANTO** ».

S-ro Fr. Schellekens, kiu elpensis tiun programon kaj respondis pri ĝia efektivigo, komencis tiam, kun S-ro J. Montmirail kaj kelkaj aliaj lokaj esperantistoj, organizi la elprenon kaj transdonon de la balonoj al la aĉetintoj.... Multaj efektive antaŭmendis.... Sed multaj ankoraŭ pli-mendis balonojn surloke.... ĉe ne-esperantistaj preterpromenantoj.

Tiu ĉi malgranda evento efektive altiris la atenton de multaj preterpasantoj kaj speciale de multaj infanoj, por kiuj S-ro Jaumotte tuj ekiniciatis komunan balon-suprenirigon.... estis multaj laŭtaj ridoj kaj aplaŭdoj kaj « oj »ekkrioj.... sed ne infan-ploroj!

Post duono da horo, la « festeto » finiĝis kaj restis al ĉiuj agrabla duon-posttagmezo por promenado aŭ sideo ĉe suna kafeja teraso.

Solena kunsido de B.E.F.

Je la 18a, S-ro M. Jaumotte, ĉirkaŭita de la du prezidantoj S-roj Debrouwere kaj Denoël, prezidis solenan kunsidon de la membroj de B.E.F. kaj multaj membroj speciale venis por ĝin ĉeesti.

La ĝenerala prezidanto prezentis la nov-elektitan estraron, donis kelkajn informojn pri la lasta laborperiodo kaj tiam anoncis la elekton de LIEĜO, kiel kongresurbon por 1964.

Dum tiu jaro, la Lieĝa Grupo jubileos kaj dum tiu jaro ankaŭ, devus tie okazi la trilanda Renkontiĝo, kiu regule kunigas belgojn kun nederlandanoj kaj germanoj el la landlimaj regionoj. Niaj lieĝaj amikoj klopodos kunigi ĉion en unu granda festo, kiu tiel povos iĝi granda propaganda evento.

Je la alvoko de sia nomo, 56 ĉeestantoj jam tuj aliĝis al kaj pagis por la kongreso 1964 en Lieĝo.... Kaj dum la Festeno ankorau aldoniĝis la familio Kervers, kvar personoj, el Hago kaj iu aŭ alia samideano, tiel ke nia Honora Kolono jam konsistas el pli ol SESDEK personoj!

La Festeno

Belaj aspektis la tabloj por la granda festeno, por kiu enskribiĝis ĉirkaŭ 110 personoj.

Senprotokole, ĉiuj povis elekti sian lokon, dum nur la du asociaj prezidantoj kaj la LKK-prezidanto elektis lokon, iom meze de la ĉeftablo, por eventualaj alparoloj.

La menuo estis bonega kaj bele prezentita. La kongresaninoj ricevis florbukedon kaj ĉiuj, krom la tolan tablotukon, ankaŭ paperan, ornamitan per la kongresa stampilo, verkitan de S-ro J. Montmirail.

Je la komenco, S-ro Jaumotte deziris al ĉiuj bonan apetiton kaj poste li anoncis la sukceson de la Honora Kolono por la estonta Kongreso, kaj varme dankis la prezidanton de la L.K.K., S-ron Volders kaj ĉiujn ties helpantojn, kiuj, dum semajnoj, ĉion antaŭpreparis, ĉu ili apartenas al la L.K.K. mem, ĉu ili estas fidelaj helpantoj, preskaŭ anonimaj.

S-ro M.H. Schippers certigis ke, — malgraŭ la ĉesigo fare de **LEEN de la komunaj kongresoj beneluksaj**, — la amikaj rilatoj inter la du Asocioj estos daŭrigataj kaj li esprimis la esperon, ke la persona kontakto inter la samideanoj el la du landoj restos almenaŭ same bona kaj ofta, kiel ĝis nun.

La Balo

Estis jam iom post la 9a, kiam la orkestro « Nelles kaj liaj solistoj » enkondukis unuan dancarion.... Kaj tuj el la angulo de jam envenintaj ne-partoprenintoj al la festeno, kiel de ĉe la festenaj tabloj, ekleviĝis multaj dancemuloj.... Kaj, ĝis ekzakte la 25a horo,la unuan do, jam en la lunda mateno, daŭris tiu dancado, vigla kaj varmiga.

Ankaŭ okazis tombolo, por kiu S-ino Volders kaj kelkaj amikoj vendis biletojn, dum S-roj Volders kaj Segers, — helpataj de F-ino F. Sprengers, kiu eltiris la biletojn, — zorgis ke ĉio glate funkcias.... Kaj tiu tombolo alportis al la LKK-kaso sumon eble tre bonvenan por la ekvilibro de la budĝeto.

La Lunda tago

Plej verŝajne multaj partoprenintoj al la tri kongrestagoj, memoros plej agrable, ĝuste la lastan tagon.... tagon de surprizoj, de gaja folkloro kaj de veraj rideksplodoj!



Parto de la ĝepartoprenantaro

Je la 8,30a du grandegaj aŭtoĉaroj alvenis ĉe la Operdomo, kie atendis la granda grupo de antaŭpagintoj.... kaj kelkaj kuraĝuloj, kiuj venis « sen granda espero ».... Dank'al forfalo lastmomenta de unu aŭ du kongresanoj kaj al ioma premo de kelkaj infanoj-partoprenantoj, ili finfine tamen trovis lokon en la « elluitaj » aŭtoĉaroj.... aŭ en unu el la sekvontaj privataj aŭtomobiloj!

Oni tuj direktis al la ZAMENHOF-strato, kie, en la numero 7, — loĝejo de S-ino J. De Hondt kaj de filo Henri, — montriĝis ĉe la fenestro bela verdstela flago.... Post kelksekunda haltigo, oni tiam daŭrigis tra la Rupelregiono, tiu de la briksfabrikejoj, al Boom kaj, tra koketaj vilaĝoj kun tre mallarĝaj stratetoj, al St. Amands (Puurs), dum en ambaŭ aŭtoĉaroj S-roj R. Van Eynde kaj M. Jaumotte donis ĉiujn deziritajn klarigojn.

En St. Amands, atendis la kongresanojn, reprezentanto de la komunuma estraro, S-ro Brugmans, kaj la konservatoro de la Verhaeren-muzeo, S-ro Servaes.

S-ro Brugmans deziris al ĉiuj bonvenon en St. Amands kaj donis kelkajn klarigojn pri Emile Verhaeren. S-ro M. Jaumotte dankis lin kaj tuj komencis, laŭte kaj animplene, deklami la faman poeziaĵon de Em. Verhaeren « Le Passeur d'Eau » — « La pramisto ».... Kaj forte disiris en la aeron la sonoj de nia bela lingvo.

Forte trafis tiu belsoneco la konservatoron de la Muzeo, kiu tute ignoris ke, jam en 1928, aperis en « Belga Antologio » pluraj poeziaĵoj de Verhaeren.

Li nepre dezirus akiri por la Muzeo ekzempleron de tiu libro.... Sed, — ĉar ĝi estas jam de longe elĉerpita, — S-ro Maur. Jaumotte promesis havigi al li donace restantan aŭtor-ekzempleron.... pro kiu la konservatoro ŝajnis vere dankema.

De St. Amands, la vojaĝo iris al Rupelmonde, kie ni haltis en Scaldiana-Mercatoria.... Kaj tie komenciĝis la surprizoj kaj la amuzo!

Ĉiuj kongresanoj tuj amasiĝis ĉirkaŭ la moderna monumento de Reinaert de Vos, — la Vulpo, — antaŭ la Skeldo-bordo, kie S-ro Peleman, la konservatoro de la diversaj muzeoj kaj folkloraj aranĝoj de Rupelmonde, ilin tutkore bonvenigis.

Li anoncis ankaŭ la venon de grava Moŝto.... Kaj efektive jen alvenis Lia Moŝto la Vulpo, kun en unu mano ornamita bastono kaj en la alia perkamento.

La Vulpo, staranta sur ŝtupo antaŭ sia monumento laŭtlegis Ordonon, per kiu li bonvenigis ĉiujn kaj dekretis ke estas, hodiaŭ, nomata « Kavaliro en la Ordeno de la Vulpo » : S-ro Maurice Jaumotte, ĝenerala prezidanto de la Belga Esperanto-Federacio.

Kaj tion dirinte, li pinglis ĉe la maldekstra ŝultro de la nova kavaliro belan vulpo-voston, kiel elmontron de lia nova altranĝeco.

Vulpo kaj nova kavaliro ĉirkaŭbrakigis unu la alian kaj faris honorpromenadon, dum kiu multaj fotografamatoroj eternigis la « eventon ».

S-ro Peleman kondukis la grupon tiam al la bela ekspozicisalono, kie estas vere gravaj artverkoj, kiuj ĉiuj rilatas al la historio de la Vulpo.

Post kelkaj momentoj, oni daŭrigis al la Panoramo, kie speciala sonbendo, verkita en Esperanto, donis ĉiujn informojn pri la 14 vitrinoj, en kiuj estas resumita la historio de la urboj, kiuj kuŝas ĉe la Skeldo-bordo, inter la nederlanda landlimo kaj la plataĵo de St. Quenstin.

Longaj tabloj atendis tiam la grupo por la lunda lunĉo, kiu estis plena tagmanĝo, kun supo, Brueghel-plado, kaj deserto.

Sur la tablotuketoj de « Scaldiana » mem, deziresprimo estis ripetita en 12 lingvoj inter kiuj ankaŭ en Esperanto : « **Bona Apetito** » !

Dum oni tagmanĝis, alvenis alia grava grupo de konservatoroj de folkloraj muzeoj, kiuj speciale studas la « hejmajn » kutimojn. Tiu ĉi societo, veninte el Gento, kaj kiu grupigas ĉiujn samcelanojn el Orient-Flandrujo, estis gvidata de du membroj de la « Rega Komisiono pri Popolscienco », S-roj Van der Linden kaj Vankenhoven, respektive prezidanto kaj vicprezidanto de la Societo.

Kaj por tiuj ĉi du eminentuloj, okazis simila ceremonio antaŭ la statuo de la Vulpo.... Ambaŭ estis kavalirigitaj.... Kaj S-ro Jaumotte, kiel unua kavaliro, iris por ilin ankaŭ doni la « accolade ».... Kaj tiel tio fariĝis gaja afero, kiu incitis s-ron Vankenhoven alparoli, — ĉe la mikrofono en la restoracisalono, — la esperantistojn en iu esperanto-lingvo, iom simila al tiu latina lingvo de malbona studento.... nederlandaj vortoj kun **us** kaj **i**.... Kaj tio kompreneble naskis grandan rideksplodon.... S-ro Jaumotte siavice salutis ĉe la gentaj amikoj, kaj estis interkonsentite inter la du prezidantoj, ke io plia devus ankoraŭ okazi por pliintimigi la du grupojn.

Kaj je la 14,10a h., — do ĵus antaŭ la foriro de nia grupo, — ĉiuj ankoraŭfoje ariĝis kaj la tri kavaliroj supreniris podion. S-ro Vanderlinden tiam transdonis al S-ro Jaumotte belaspektan marsipankukon, kies supra flanko montras la fasadon de genta muzeo.

S-ro Jaumotte senkulpigis sin, ke li nenion estis alportinta.... kaj povis do nur transdoni ŝnuron !.... kiun la « stroppendrager » (ŝnurportisto) Vankenhoven tuj metis ĉirkaŭ la kolon.... S-ro Jaumotte tamen ankaŭ transdonis al s-ro Van der Linden unu el la tablo-flagstangetoj, kiujn ni esti kunportintaj por ornami la tablojn de la restoracio. Sur ĝi estis inke indikita : « **3a de junio 1963 — Jubilea Beneluksa Kongreso** ».

S-ro Peleman, vidante en nia grupo hinduon kun turbano, vokis ankaŭ lin sur la podion kaj metis ĉirkaŭ lian kolon, ĉeneton kun ruĝa fiŝo.... Kaj denove la ekkrioj kaj ridegoj eksplodis.... dum la fotografiistoj laboregis.

Post fina enbrakigo de la tri kavaliroj.... ĉiuj rapidis al la aŭtoĉaroj, por reiri al Antverpeno, kie ankoraŭ okazis detala vizito de la Internacia Marista Domo, kiun direktas nia samideano Henri Sielens.

Lasta halteto ĉe la Pilotejo, kie S-ro R. Van Eynde, — kiun S-ro Jaumotte tie dankis cetere pro lia bona gvidado, — donis lastajn klarigojn pri la antverpena haveno.

Kaj ekzakte je la 16a, ĉiuj eksaltis el la aŭtoĉaroj antaŭ « Witte Leeuw », kie ĉiuj supreniris kaj ankoraŭ kunestis ĝis la 5a aŭ 5,30a.

Tie, S-ro F. Volders ĉiujn dankis, la partoprenintojn kaj la aranĝintojn, kaj inter ili li speciale aplaudigis la nomon de la ĝenerala prezidanto, la vera organizanto de la Kongreso.

Tiu ĉi respondis, ke nur lia longa sperto ludigis al li iun rolon, sed ke li konservos ankoraŭ longtempe plej bonan memoron pri la kuniaboro, kiun li havis kun S-ro F. Volders kaj lia ekipoj, kies membrojn li varme aplaudigis.

S-ro H.M. Schippers rediris sian veran ĝojon pro tiu ĉi lasta bela, gaja tago, pro kiu li ankoraŭfoje volis nepre danki ĉiujn organizintojn.

Kaj tiel finiĝis vere bela kongreso, bonege organizita kaj speciale sukcesigita de varma suno !

L. K.

KARAVANO AL LA SUNO

Foriro de Bruselo : mardo la 30.7.1963 je la 9-a horo

Forirloko : Hotelo Montca Nord

Membroj de la Bruselo grupo kluj volas adiaŭi, estas bovenaj :

ĉe la reveno, la 18.8.1963, dimanĉo, ni atngos la saman lokon versajne ĉirkaŭ la 18-a horo.

nia kongresa Balon-ratio

En la proksima numero, ni publikigos la liston de la posedantoj de la kartoj, kiuj revenis post nia Balon-ratio... Ni diru nur ke, — ĝis nun, — kartoj revenis el ANGLUJO, regiono de Dover; el NEDERLANDO, kaj el la du FLANDRIOJ, precipe de ĉe la marbordo... Kaj ke, — ĝis nun ankaŭ, — la laŭreato, kies balono do flugis plej malproksimen, povus esti ĉu nia ĝenerala prezidanto S-ro M. Jaumotte, ĉu nia valona sekretario S-ro G. de Cuyper... kaj ke, inter tiuj, kies karto revenis jam preskaŭ tuj post la kongreso, estas ankaŭ du aliaj kongres-prezidantoj S-roj G. Debrouwere kaj H.M. Schippers; nia kasistino J. Terry'n kaj ankaŭ S-ro H. Boffejon !

B. E. J. A.


La 2-an de junio, dum la Beneluksa Kongreso, okazis la unua laŭstatuta ĝenerala jarkunveno de B.E.J.A. (Belga Esperantista Junulara Asocio). Dum tiu-ĉi kunveno estis elektata la nova estraro.

Ĝi konsistas el :

- **Prezidanto** : Ivo Durwael, Dolfijnstraat, 77, Antwerpen,
- **Vic-prezidantino por Flandrujo** : Francine Cornette, Daniel Herreynsland, 149, Wilrijk,
- **Vic-prezidanto por Valonujo** : Serge Denoël, 20, rue Victor Raskin, Liège,
- **Ĝenerala sekretario** : Roger Van Humbeeck, Dambruggestraat, 296, Antwerpen,
- **Sekretariino por Flandrujo** : Yvonne Poupey, Elf Julistraat, 11, Brugge,
- **Sekretari(in)o por Valonujo** : tiu funkcio estos poste atribuita,
- **Kasistino** : Ingrid Maes, Lange Elzenstraat, 63, Antwerpen.

La nombro de la B.E.J.A.-membroj daŭre kaj konstante kreskas. Ni rajtas esperi ke B.E.J.A. iĝos forta Esperantomovado en nia lando. Ni urĝe petas ke ĉiuj esperantistoj, malpli ol 25-jaraj, kiuj ankoraŭ ne ricevis « informilo » de B.E.J.A., tuj sciigu sian nomon al la ĝenerala sekretario.

Regule ni ricevas informpetojn pri Esperanto kaj Esperanto-kursoj. Tial ni insistas ke la respondeculoj pri tiaj kursoj sciligu al la ĝenerala sekretario ĉiujn informojn tiurilate.



KRUCVORTENIGMO N° 5

| | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 | 9 | 10 |
|----|---|---|---|---|---|---|---|---|---|----|
| 1 | | | | | | | | | | |
| 2 | | | | | | | | | | |
| 3 | | | | | | | | | | |
| 4 | | | | | | | | | | |
| 5 | | | | | | | | | | |
| 6 | | | | | | | | | | |
| 7 | | | | | | | | | | |
| 8 | | | | | | | | | | |
| 9 | | | | | | | | | | |
| 10 | | | | | | | | | | |

Horizontale :

- 1) malhelpas ke la homoj restu hejme.
- 2) rezultat' — esprim'.
- 3) plej bona metodo por dormi.
- 4) kvalito — dio de la vento.
- 5) tuf' da haroj — mallongilo por : parto de la biblio.
- 6) moke paroli.
- 7) brua gajeco — ne facila pronomo.
- 8) infano — ĝi en angla — pelt' aŭ gant'.
- 9) kondiĉa konjunkcio — prefikso por signifi komencon.
- 10) mezurilo.

Vertikale :

- 1) stranga turist'
- 2) per spirita koncepto.
- 3) malhelpas ke la homoj forlasu sian hejmon.
- 4) laŭ maniero de militista estro — bela sent'
- 5) rakontar' pri la dioj.
- 6) Organiza Komitato Internacia — Inklin' por skribi resumon.
- 7) malhelpi — konjunkcio.
- 8) Esprim' propra al iu lingvo.
- 9) persona pronomo — nedifinita persono.
- 10) skribmaniero.

- N.B. 1) La apostrofo (') post difino, aŭ post iu vorto de la difino, montras ke nur la radiko estas enskribota, do sen finaĵo.
- 2) La solvo aperos en la sekvonta numero, kun mencio de la solvintoj, inter kiuj libropremio estos ellotata.
- 3) Sendu vian solvon al : Ch. Poupey, Elf Julistraat, 11, Brugge, dum la 10 unuaj tagoj post la apero.

NEPRE ENSENDU VIAN SOLVON, SE NE, KIEL VI VOLAS KE NI SCIU ĈU TIU ĈI RUBRIKO INTERESAS VIN ?

SOLVO DE LA PROBLEMO N° 4

- S O N O R I L O -
 - Z A M E N H O F -
 K - J O K E O - O K
 O N U - Z O N O - O
 N N R - E N E N - M
 G - A T M O S - O P
 R E - R P - T I A R
 E L P E L I - U Z E
 S I - F E L O - A N
 O P - O R A N A N O

Inter la diversaj ensendaĵoj, naŭ sen-
 ralaraj de : Sro. P. De Smedt, St.-Gillis-
 Dendermonde ; Sro. Iserentant, Bruĝo ;
 Sro. A. Vande Velde, Gento ; Sro. H. De
 Hondt, Antverpeno ; S-ro. E. Ernst,
 Bruselo ; F-ino. M. Willems, Bruĝo ;
 Sro. M. Lemme, Lieĝo ; Sro. L. De Mar-
 ré, Antverpeno kaj F-ino. E. De Coene,
 Ekeren. Lotumado (dum kunveno
 B.G.E.) aljuĝis la libropremion al Sro.
 De Smedt Petro.


FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN

P. V. B. A.


St.-Bernardse steenweg 631
 Hoboken

Vitraloj - Speguloj -
 „securit“ vitro
 kolorigitaj vitroj
 alumintaj senmastikaj
 stangoj por kupoloj

Vitro cementoj por
 tutvitra-konstruaĵoj
 mastiko
 telefono 37.88.20



Postkongresa Laboro
 Kial ni ne edziĝis al
 Esperantistino?



Por daŭrigi la diskuton de
 antaŭ la estrarkunveno!

FEDERACIAJ SCIIGOJ

Dumkongresaj estrara kaj administrantara kunsidoj

La ĉefestraro kaj la administrantaro de Belga Esperanto-Federacio havis, dum la kongresa sabatago, apartajn kunsidojn.

Du ĉefaj punktoj estis pritraktataj :

Nia revuo : La nuna numero, kiu rilatos al junio-julio-aŭgusto, aperos plej laste la 1-an de julio.

La grupsekretarioj ensendu siajn programojn kaj raportojn, por la numero septembro-oktobro, plej laste ĝis la 15a de aŭgusto. La numero efektive aperos ĉirkaŭ la 10a de septembro.

Ĉiu bonvolu atenti ke ĉio enpresigota devas esti sendata rekte al S-ro Fernand Roose, St. Klaradreef, 59 Brugge.

Nia Kongreso 1964 : Pro la fakto, ke la nederlanda Asocio LEEN deziras repreni sian liberecon kaj, ĉiuokaze, ne intencas organizi kongreson dum 1964, pro la Universala Kongreso en propra lando, la estraro unue kaj la administrantaro poste ekzamenis detale la problemon de nia Kongreso en tiu jaro.

Ambaŭ unuanime decidis, akcepti la inviton de la Lieĝa Grupo, kiu jubileos dum 1964 kaj kiu organizos do la Kongreson, en la kadro de tiuj jubileaj festoj, kaj, eble ankaŭ, en la kadro de la trilanda renkontiĝo, kiu estas ankaŭ okazonta en Belgujo en tiu jaro.

Tiel tiu Belga Kongreso provus iĝi vere grava evento.

FILMA, DIAPOZITIVA kaj MAGNETOFONA RUBRIKO

Ni atentigas la esperantistojn tra la tuta mondo ke la antverpena grupo « La Verda Stelo » akiris novan sukceson por Esperanto. La urbestro de Antverpeno decidis meti je la dispo de la vizitantoj de la muzeo « Plantin-Moretus » porteblan disaŭdigilon en Esperanto kiun ili povas lupreni surloke.

Do, vizitonte Antverpenon, kaptu tiun okazon kaj utiligu tiun plian sukceson sur la Esperanta kampo.

Helsingör invitas vin

21.-28.7.1963 okazos la feriaj Esperantokursoj : 1) konversacia, 2) perfektiga, 3) elementa laŭ naturmetodo, 4) prepara kurso por naturmetodaj ĝeinstruistoj, 5) preleĝoj literaturaj. Alĝo antaŭ 20/6. Detala programo havebla ĉe

S-ro L. Friis,
 Ingemannsvej 9,
 Aabyhøj, Danlando.

10 francaj ĝelernantoj planas interŝanĝvojaĝon al Belgujo, Germanujo, Nederlando aŭ Svisujo. Informojn donas Esperantoklubo, Les ANDELYS EURE, FRANCUJO.

RECENZOJ

«Verdiro»: «Elingita Glavo». Originalaj ĵurnalistaj artikoloj. Eldonis Stafeto el La Laguna, Kanariaj Insuloj en 1962. Serio de la Beletraj Kajeroj. 148 paĝoj. Prezo: 1.20 Us.Dol.

Tro negativa! Tro negativa kaj tro supraĵeca! Jen la fina juĝo kiun mi devas esprimi post legado. Ja, la aŭtoro estas anarkiisto, kaj do li devas honorigi sian tendencon! Mi pensas ke alia kaŭzo de tiu ĝenanta negativeco estas la fakto ke li prenis sur si la taskon por aperigi artikoleton en ĉiu numero de la semajna «Socialist Leader». Mi imagas facile ke ofte la inspiriĝo mankis kaj ke li tordis la cerbojn por trovi ion. Eble tio estas la klarigo por la diskreditigo de la parolado de Dr. I. Lapenna dum la kongreso en Bruselo en 1960, unu de la plej bonaj paroladoj, kaj laŭ formo kaj laŭ enhavo, kiujn mi iam aŭdis (legu: Lingva analfabeteco sur p. 121). Sed la ĉefa malkvalito de la aŭtoro kaj do de la verko estas ke de ĉiuj kaj ĉiaj malbonoj sur la tuta universo li vidas nur unu kaŭzon: la soci-ekonomia strukturo. Nur tiu faktoro kreas situaciojn kaj do la historion. Ho, sancta simplicitas! Ke la vivo estus facila se de ĉiuj malbonaj situacioj estus nur unu kaŭzo. Tio simplecon de spirito ni povas kompreni de arda junulo kiu estas en la komenco de la malkovro de la vivproblemoj; sed ne plu de maturiĝinta homo! La vivo estas multe kaj multe pli komplika! Multegaj, plej diversaj faktoroj diktis la parolojn kaj farojn de ŝtatestroj kaj de aliaj gvidant(ar)oj. Tipa ekzemplo de tiu unuflanka pririgardo de la aferoj estas «Mondsklaveco» (p. 51) kie li estas kontraŭ mondfederalismo. Tie li pruvas ankaŭ ke li tute ne havas komprenon pri la evoluo de la historio rilate al la rolo de la hom-grupoj, familioj, komunumoj, popoloj. En «Racio kaj Raseco» (p. 46) kie li asertas ke UNO kaj UNESCO kaj tutmonda registaro estas nur «organoj por grupo kiu volas pro potenco, eĉ pli certe ensklavigi la homaron» (p. 48) li pruvas ke li tute ne vidas la evoluon en la sino de tiuj organizoj. Certe, ankaŭ tio estas ekstrema grava ke inter la aŭtoro kaj mi staras kelkaj fundamentaj opini-diversecoj. Ekz. kie li diras ke popolo estas nur organizo kaj ne organismo, tie mi esprimas mian kredon ke popolo estas jes organismo.

Sed mi nun mem evitu ke mia recenzo fariĝu tro negativa kaj tro unuflanka! Do, ni diru ankaŭ ke la enhavo de la artikolaro estas plej varia. En «Sandaloj» (p. 21) kaj «Frak-esperantistoj» (p. 49) ni trovas psikologion de la vestaĵoj. Se ni akordiĝas kun li ke la maniero de vesti sin montras dependecon aŭ sendependecon de iaj soci-ordoj, li tamen devus ankaŭ cedi ke ekzistas manieroj de vesti sin kiuj atestas pri ne-en-ordeco de la spirito kaj de la psiko; kaj ke tiel vestitajn samideanojn ni prefere ne vidas dum iaj ceremonioj; kaj cetere nenie! En «Klerula manio» (p. 112) li malaprobas ke iu klerulo diris ke oni nepre devas legi esperanto-verkojn kaj -poezion (estas W. Auld kiu diris tion en la enkonduko de la Esperanta Antologio; sed li efektive iom «forte» diris tion!) sed en alia artikolo la aŭtoro diras ke pli ol esperanto mem, gravas la spirito de tiuj kiuj uzas ĝin (p. 120). Nu, kelkaj de tiuj verkistoj klopodas por enpenetri en la esperantistojn novan etoson; kaj ili klopodas por evidentigi kaj klarigi la ideologian bazon de nia movado! Tre feliĉiga pozitiva flanko estas ke la libro entenas multajn pripensindajn ideojn, trafajn rimarkojn. Kun multo mi plene konsentas. Kelkaj ĉapitroj ekz. (i.a. «La aŭtoritata danĝero») montras la mankojn de aŭtoritatoj kiuj fakte ne gvidas. En aliaj li pritraktas la demandon ĉu laboro estas vere beno? kaj li prave asertas ke devus esti malpli da laboro, pro la produkteleco de la maŝinoj. Sed ĉu li ne vidas ke ni iras en tiu direkto? kvankam malrapide. Ankaŭ sur tiu loko la aŭtoro estas tamen tro

supraĵa. Li devus scii ke restos ĉiam laboro ĉu permana ĉu spirita; kaj ke la laborado estas la plej bona afero kiun la homo povas fari. Sed! Ni devus distingi inter la laboro deviga, preskaŭ sklava, ofte stulta kaj neutila kaj la laboro kiun ni volas kaj devus fari pro mankoj kiujn ni vidas kaj bezonoj kiuj ekzistas; kaj pro nia propra «genieco» kiu devas esti en la eblico manifestiĝi. Kaj tia laboro estus beno! Kelkfoje la aŭtoro trafas paradokson kaj li atestas pri «fera» logiko; ekz. en «Du Skoloj» (p. 124) kie li akuzas la paradokson de la «International Friendship League» kiu uzas nur kaj permasas nur la Anglan lingvon! Iom patetika estas la ĉapitro «Mi ne komprenas» sur p. 140. Sed mi ne dubas ke multaj legos ĝin kun plezuro. Sajnas al mi ke la aŭtoro estas naiva kiel J.J. Rousseau en la kredo ke la homo estas denature pacema kaj amikema. En tio li ne malpravas, se li aldonus ke la homo estas ankaŭ egoista! La artikolo «La neologisma malsano» sur p. 72 havas mian tutam aprobon. Ankorau multon mi devus kaj volus preparoli. Sed la recenzo iĝus tro longa. Multaj rimarkoj interesis min. Ekzemple lia (fiera?) rimarko pri la pliforteco de la Skotaj Futballudistoj sur la Anglaj. Tion mi efektive sciis kaj mi tuj enrigardis la statistikojn de la ĵarlibroj de la F.I.F.A. Mi konis la preskaŭ legendan figuron de Alec James, antaŭ la milito; kaj mi vidis Pearson tuj post la milito, de kiu unu ludruzaĵo estis poste ofte imitata. Sed mi ne kapablas juĝi pri la ĝusteco de la diferencoj inter Skotoj kaj Angloj en la artikolo «Skoto: Anglo» sur p. 94. Mi devas veni al konkludo. Evidente la aŭtoro volis meti la fingron sur «vundoj» en la esperanto-movadoj neŭtrala kaj neneŭtrala. Kaj tiaj ekzistas, kompreneble! «Nihil humanum a me (= al la esperantomovado) alienum est!»! Sed tiurilate mi volas publikigi iom urĝan sugeston. Jen ĝi sekvas. Gis antaŭ nur kelkaj jaroj la diversaj ideologiaj grupoj (Katolikoj, Protestantoj, ateistoj, socialistoj k.a.) akre atakis unu la alian. Tion ili ankoraŭ faras. Sed en ĉiuj tiuj grup(ar)oj manifestiĝas tendenco al interkompreniĝo kaj pliproksimiĝo. Tio estas efiko de la unuiĝo de homaro kaj mondo. Nu, en tiu tendenco esperantistoj neŭtralaj kaj neneŭtralaj devus stari en unua vico; kaŭze de ilia universaldirektiteco. Malfeliĉe tio tre ofte ne estas la kazo. Ĉu du ekzemploj? El ambaŭ kampoj unu. La ofte tre fanatika kaj malĝusta informado en «SAT-Amikaro» kaj en «Sen-naciulo» pri katolikaj registaroj, landoj kaj personoj. Aliflanke la mallarĝanima sinteno de katolikaj esperantistoj rilate la aliajn... literaturojn ktp. ktp. En katolika revuo mi devis foje legi riproĉon al alia katolika kiu kuraĝis pretendi ke ĉiu kulturita homo devas esti leginta verkojn de Voltaire (tio okaze de recenzo pri «Tri verkoj de Voltaire»). La samideano kiu estos sisteme kontrolinta tiun fenomenon en nia movado, kiu estos ordiginta la faktojn kaj kiu publikigos tion, svingos envere elingitan glavon! La nuna, kiu kuŝas sur mia skribotablo estas leginda, vere, nepre! La alia estus sensacia!

Drs. F. ROOSE.

Hans Christian Andersen «Fabeloj» 4a volumo. En traduko de Dr. L.L. Zamenhof. Eldonis «Heroldo» Brusel en 1962. Prezo 3 Us.Dol. 244 paĝoj. Kun specialaj desegnaĵoj de la Pola artisto Antoni Uniechowski.

Tiu volumo estis neniam eldonita. Nun faris tion «Heroldo» kaj ĝi estas belega eldono kiun ni forte rekomendas. En ĉiu ekzemplero troviĝas speciala rabatkupono de la valoro de 4 stcloj por la akto de la reeldonota unua volumo de tiuj fabeloj. Ni esperas ke recenzo estos preta en sekvonta numero de nia revuo. Sed ni jam volis nun atentigi pri ĝia apero kaj jam nun konsili la aketon.

GRUPA VIVADO

ANTVERPENO

Esperanto-Grupo « La Verda Stelo »

La 8an de marto S-ro C. De Cock paroladis pri « Naturismo ». Li ne nur varme pledis por kaj defendis la nudismon, sed skizis ankaŭ la historion de tiu viv-koncepto, citante diraĵojn favorajn de diversaj filozofoj. Cetere li pritraktis la tuton laŭ vere delikata maniero kaj konklude oni povas diri ke la paroladisto sukcesis vekti la atenton de la publiko.

La 15an S-ro J. Verstraeten paroladis pri « Een Mens van Goede Wil » (Bonvoleculo), flandra libro verkita de G. Wlschap. La paroladisto rakontis la historion de tiu libro kaj ankaŭ tium de sia propra juneco kaj trovis inter la du tian paralelon ke li eble pli ol kiu ajn estis influata. Tial li trovas tium libron unu el la plej bonaj kiujn li iam legis. Dum la 2a parto de la kunveno estis aŭdigata parto de la debato pri « Esperanto kaj Neo » inter S-ro Maur. Jaumotte kaj S-ro Alfandari, kreanto de Neo, — debato pri kiu oni certe pli detale legis en antaŭa

La 22an dum la rubriko « ĉirkaŭ la Fajro » F-ino H. Hofkens kaj S-roj L. numero.

De Marré, I. Durwael kaj J. Verstraeten laŭlegis siajn kontribuojn.

La 29an la J(unulara) A(ntverpena) S(ekcio) JAS prezentis kabaretan vesperon en tutspeciala formo, laŭ tre moderna koncepto, ĉio tio danko al la kunlaborado de F-inoj E. De Roover, I. Maes, G. Leibovitch kaj S-roj R. Dedecker, G. De Raedt, I. Durwael, Marc Van Brabant kaj Roger Van Humbeek.

La 5an de aprilo, laŭ modelo de la Flandra Televido, F-ino B. Geers, S-roj M. Jaumotte, Fr. Schellekens kaj J. Montmiraël prezentis tut-novan programon: « Iniciado al Pentro-arto: Art-trezoroj en Flandrujo ». Helpe de la nuntempaj modernaj rimedoj: sonbendo kun kolordiapozitivaj, ili vere sukcesis alporti ion novan kiu cetere akiris tondran aplaudon. Menciinda tamen estas ke la realigo de tiu programo postulis pli ol 80 horoj da streĉa laboro (traduko de flandra teksto — kopiigo en diversaj ekzempleroj — fa-

rado de diapozitivaj — surbendigo de la teksto parolata — priparolado de la arangoj, ktp) Sed oni povas fieri pri la akirita rezulto!

La 12an dum la Sankta Vendreda programo S-ino E. Riadis paroladis pri la paskaj kutimoj en Grekujo kaj alportis amason da kuiritaj ovoj, helruĝaj kolorigitaj kaj kiujn ŝi donacis al la ĉeestantoj laŭ speciala tradicia Greka maniero. S-ro I. Durwael atakis gravan temon « La Junularo kaj la Paco ». S-ro Fr. Schellekens deklamis la impresplenan esperantaĵon de O. Van Schoor: Judaso kaj S-ro L. De Marré klarigis la profundan tradician signifon de Pasko en la naturo kaj la religio. S-ro R. Van Eynde finfine montris filmon pri paskaj kutimoj en Ukrainio, kiun li vigle komentariis.

La 19an: tre speciala programo. S-ro H. De Roover paroladis pri « Jogo », la hindua sistemo de filozofia meditado kaj asketismo. S-ro De Roover ne kontentigis per parolado sed li invitis amikon-praktikanton de Jogo. Tiu siavice ne nur montris per diapozitivaj la diversajn ekzercojn, sed ankaŭ mem demonstraciis ilin praktike en la mezo de la salono. Entuziasma aplaŭdo kaj varmaj dankvortoj de la Prez. konkludis la vesperon.

Dimanĉo, la 21an posttagmeze en la kadro de EKI kaj gvidata de S-roj C. Borremans kaj E. Paesmans promenalis en la urbo alportis al la partoprenintoj 2-horan ĝuadon kaj penadon pro la multaj problemoj kaj taskoj kies bonaj solvoj certigis tiom da poentoj. Bela sunplena vetero pligrandigis ankoraŭ la plezuron. En « Witte Lecuw » aktiva juĝantaro konigis la gajnintojn kaj disdonis premiojn, abunde donacitajn de la diversaj grupoj kaj membroj individuaj.

La 26an S-ro R. Van Eynde okazigis dokumentan filmvesperon dum kiu la Norvega filmo « Bonvenon en Oslo » (Esperante parolata kaj pruntedonata de la Norvega Esperanto-Ligo) estis la ĉefplado!!

Dimanĉon, la 28an aŭtobusa ekskurso al « Keukenhof » en Nederlando kunigis pli ol 30 verdstelanojn dum tuta tago en « samideana » sfero. Krom Keukenhof, kun la mirindaj florbudoj ĉiuspe-

caj, oni vizitis Avifaŭna(n), Rotterdamo(n) kun la nova sidejo de UEA, Den Haag kaj Scheveningen. Kvankam la vetero ne estis ideala, tamen la bonhumoro regis daŭre kaj konstante tiel ke post la reveno ĉiu adiaŭis kun rideto sur la lipoj!!

La 3an de majo pro malhelpo de S-ro F. Schellekens lia vespero pri « Sud-Afriko » ne povis okazi. Ĝi estis anstataŭata per belega paroladeto de S-ino Frieda De Roover (gratulojn pro la bela prononcado) pri « Niaj Ardenoj ». Si ilustris ĝin per tuta serio da kolordiapozitivaj dum S-ro R. Van Eynde ne nur estis tiel afabla enkonduki ŝin sed ankaŭ prezentis belan turisman filmon. Plue li klarigis la enaktivadon de la nova ŝipo « Breughel » konstruita de Cockerill-Ougrée en Hoboken kaj kies baptopatrino estis nia reĝino Fabiola.

LES ENTREPRISES

DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO

Tel.: 15.19.92

Entrepreneo de
KONSTRUAĴOJ

La 10an de majo S-ro H. De Roover, la paroladisto de Jogo antaŭ kelkaj semajnoj, denove pritraktis tutan alian temon dum nova parolado: la ŝvebaviadila sporto kun amaso da lumbildoj. Kaj same kiel la antaŭa fojo li ne nur kontentigis per simpla parolado, li invitis amikon-specialiston, S-ron Leo Loveniens, ŝvebaviadila piloto kiu jam akiris iun gravan flugateston kaj kiu en la komenco de la jaro akompanis la belgan taĉmenton partoprenintan al la Monda Konkurso en Argentino. Pri tio li faris filmon en koloroj kaj pri la belega rezulto oni havis la plezuron ĝin vidi sur la blanka ekrano.

La 17an S-roj R. Van Eynde, L. De Marré kaj H. Vermuyten organizis belan vesperon pri « Alice Nahon » kiu mortis (tro juna) ĝuste antaŭ 30 jaroj. Estis S-ro L. De Marré kiu faris ampleksan biografion de tiu rimarkinda flandra poetino dum S-ro H. Vermuyten talentplene deklamis multajn el ŝiaj poemoj eĉ kelkaj kiujn li mem tradukis. S-ro R. Van Eynde aldonis multajn sciindaĵojn el ŝia vivo ĉar li

persone multe kontaktis kun ŝi kaj li substrekis la tuton per projekcio de diversaj unikaj dokumentoj havigitaj de ŝia familio.

La 24an oni havis la okazon aŭdi bone preparitan paroladon de S-ino Frieda De Roover kiu pritraktis sian pasintjaran vojaĝon en « Bretonlando ». La bona prononcado + la interesa enhavo streĉis la atenton de la publiko dum la multaj memfaritaj diapozitivaj en koloroj aldonis ian feinan sferon al tiu programo.

La 31an estis dediĉata al la antaŭpreparoj por la Jubilea Beneluksa Kongreso kiu okazis la 1/2/3an de junio en Antverpeno.

La 7an de junio, post detala raporto de S-ro M. Jaumotte pri la Beneluksa Kongreso, denove S-roj R. Van Eynde kaj L. De Marré plenigis la programon.

G. FAES

Eiermarkt, 21
ANTVERPENO

★ Por via MUZIKO
RADIO kaj GRAMOFONO

Tiu lasta enkondukis paroladeton pri la sveda film-aktorino Zarah Leander dum S-ro R. Van Eynde flegis la prezentadon de ŝia filmo « La Habanera ».

FAMILIA VIVO

Naskiĝo

En la familio Deckers nova filineto « Katrientje » venis pligrandigi la familian rondon. Al la gepatroj kaj la geavoj — Ges-roj H. Vermuyten — niajn sincerajn gratulojn.

Nekrologo

1. Frato de nia fidela membro S-ro M. Du Bois subite mortis antaŭ kelkaj semajnoj;

2. En Germanujo ankaŭ subite mortis la bopatro, la patro kaj la avo de niaj bonaj membroj Ges-roj J. Hendrickx kaj la 3 filoj.

Al ambaŭ familioj ni esprimas niajn sincerajn sentojn de kondolenco.

Filma, Diapozitiva kaj Magnetofona
Rubriko

En la kadro de la kulturaj eventoj la flandra televido elsendis programon pri la « Artrezoroj de Flandrujo » t.e. ke

oni komentariis 4 pentraĵojn de famaj flandraj pentristoj. (Breughel, Van de Woestijne, Jacob Jordaens, Jan Smits). La teĥnika sekcio de « La Verda Stelo » tradukis tiun tekston kaj sonbendigis ĝin kaj aldonis la konvenajn diapozitivojn (verkitajn de S-ro F. Schellekens).

Komentario: M. Jaumotte/Fr. Schellekens. Daŭro: 1 horo. Akirebla ĉe J. Verstraeten, St.-Bernardsesteenw., 1078 Hoboken. Escepte kaj pro la grandaj kostoj: luprezo 50 Fr.

« Felicia Junularo », filmo adaptita en Esperanto, en koloroj. Daŭro 23 minutoj. Sonbendo akirebla ĉe J. Verstraeten; la filmo ĉe Commissie van Openbare Onderstand, Lange Gasthuisstraat, Antwerpen.

Sonbendo pri la debato Esperanto/Ne o (francilingva) inter S-ro M. Jaumotte kaj S-ro Alfandari. Daŭro: 1 h 30. Akirebla ĉe J. Verstraeten.

BRUGO

**Bruga Grupo Esperantista,
Reĝa Societo**

(Poŝtĉekkonto N° 4835.33)

La 12an de marto S-ino. S. Verbeke-Vanden Berghe prezentis tre interesan

paroladon kun belegaj kolordiapozitivoj pri « Vojaĝo tra Burgondujo ».

« Amuza Proceso » okazis la 19an kaj en ĝi ĉiuj ĉeestantoj ludis iun aŭ alian rolon. S-ro. Van Steckelman estis akuzita pri malrespekta agado kontraŭ la statuo de Breidel kaj De Coninck, kaj post longaj sed tre gajaj atestadoj kaj pledadoj, estis brile malŝargita de la akuzo.

La 26an estis F-inoj Yolande kaj Christine Van Parys, kiuj faris interesan paroladon kun kolordiapozitivoj pri « Vojaĝo tra la Grandduklando Luksemburgo ».

Parolata gazeto estis eldonata la 2an de aprilo kun jenaj kontribuoj: S-ro. Eneman: « La Belulino de Milano »; F-ino Yv. Poupeye: « La Pacuĝejo de Bruĝo »; F-ino, Chr. Van Parys: « La Kiso »; S-ro Van Steckelman: « La fraŭlinoj sur la ponto »; kaj S-ro. Ch. Poupeye: « La fonografo kaj Esperanto ».

La kunveno de la 9a estis dediĉata al lerniga Leksikon-kartludado kaj dum tiu de la 16a, F-ino. A. Van Evgen interese paroladis pri sia skilibertempo en St-Johan-en-Tirolo.

AĈETU ŜTOFOJN POR VIROJ JE POGRANDAJ PREZOJ

Hejmvizito en la provincoj Antverpeno kaj
Limburgo se dezirata.

Informojn:

En Esperanto

I. Durwael

Dolfijnstraat 77

Antwerpen

Tel. 03/3979.82

En la naciaj lingvoj:

L. Durwael

Rubensstraat 47

Mortsel

Tel. 03/5132.35

Portretludado agrabligis la kunvenon de la 23a, dum ke la 30an okazis konkurso pri eraraj desegnaĵoj.

La 7an de majo okazis debato pri la procesio de la Sankta Sango kaj pri la kermesa foiro.

Leciono de la elementa kurso, sub gvidado de S-ro. J. Eneman, estis donata dum parto de preskaŭ ĉiu kunveno, sed tiu de la 14a de majo estis escepte plenigita per du lecionoj.

La kunveno, kiu devis okazi la 21an estis prokrastita ĝis merkredis 22a. Ĝin ĉeestis ankaŭ multaj gemembroj de la grupo « Paco kaj Justeco ». Ĉiuj ĉeestantoj dum preskaŭ unu kaj duona horo aŭskultis silente la tre delikatan paroladon de S-ro. J. Verstraeten, el Antverpeno, kun titolo « La unua libro, kiun mi legis ». La stilo de la paroladisto estis vere poeta kaj ĉarmis ĉiujn ĉeestantojn.

La sekvantan tagon, laŭ invito de la grupo « P. & J. », kelkaj el niaj membroj partoprenis en tre lerniga vizito, sub kompetenta gvidado, de la granda vitrofabrikejo en Zeebrugge.

La 28an, F-ino. Y. Poupeye gvidis konkursojn kun demandoj pri historio, geografio, muziko kaj diversaj, kaj vendredon 30an, multaj grupanoj partoprenis al gvidata promenado tra la malnova urbo, organizita de la « West-Vlaamse Gidsenbond ».

Pluraj grupanoj ĉeestis la 1-2-3ajn de junio, la Beneluksan Kongreson en Antverpeno kaj entuziasme raportis pri ĝi dum la kunveno de la 4a.

Programo por la venontaj kunsidoj

Dum julio kaj aŭgusto: kunveno ĉi-umarde, je la 20a, en « Strijdershuis », Hallestraat N° 14, Tel. N° 347.98, kun leciono de la elementa kurso kaj/aŭ kunesto kun diversaj agrablaj aŭ lernigaj temoj.

En okazo de bela vetero, kunveno povos esti anstataŭata per vespera promenado, kondiĉe ke la gemembroj estu en la kunvenejo plej laste je la 20a akurate.

Nova elementa kurso komenciĝos meze de septembro. Propagandu do de nun!

Familla kroniko

S-ro. Edouard HERREWEGHE, membro de B.G.E. edzigis la 27an de aprilo kun F-ino Mie-Jeanne Van Belleghem. Korajn gratulojn al la juna paro!

Karloreĝa Grupo Esperantista —

Karloreĝo.

FEBRUARO — S-ro Devillez klarigis al ni « Kiel elekti purigeman edzinon », humora rakonto kiu distris agrable la ĉeestantojn.

— La 12an okazis en la Urbdomo nia Generala Kunsido. Post detala raporto de la Prezidanto, oni elektis la novan komitaton:

Prezidanto: S-ro Paulus
Sekretario: Fino Orsolini
Kasistino: Sino Paulus
Kursgvidanto: S-ro Devillez
Konsilanto: S-ro Cuyper

MARTO — S-ro Delforge parolis kun granda fervoro pri « Paco » kaj la « Movado de la 8a de Majo ».

— La 19an Fino Orsolini parolis pri la skulptisto VIGELAND kaj prezentis diapozitivojn pri liaj famaj verkoj.

APRILO — La 2an, ni aŭskultis tre interesan paroladon pri la « Mirindaĵoj de la homa korpo » faritan de S-ro Delforge. Li klarigis sian prelegon per belega gipsa korpo kiu rememorigis niajn junajn jarojn kiam ni estis sur la benkoj de la lernejo.

— La komitato multege laboris dum la sekvantaj 2 semajnoj, por prepari publikan paroladon de propagando: ni sendis pli ol 900 invitletojn!

— La 19an S-ro G. de Cuyper prelegis pri Esperanto en la Salono de la « Caves d'Artois ». Li multege interesis siajn aŭskultantojn. Tuj 3 personoj inskribiĝis al la kurso.

— La 20an, 5 Karloreĝanoj ĉeestis la renkonton organizitan de la Lieĝa Grupo kaj vizitis la bierfarejon Piedboeuf en Jupille. Fino Orsolini raportis pri tiu agrabla renkonto dum la sekvinta kunveno.

— La 28an, kelkaj membroj veturis ĝis Lille kie ili partoprenis la jaran kunvenon de la Nord-franca Federacio. Ili multe ĝojis tiun renkonton. Dum la Generala Kunsido, oni serĉis rimedon por pli oftaj kontaktoj inter belgaj kaj francaj grupoj. (1)

MAJO — La 14an S-ro Delforge devis paroli pri la « Mirindaĵoj de la homa korpo » (2a parto) sed granda malfeliĉo malebligis lian prelegon.

— La 28an, F. ino Orsolini prezentis kolorajn fotojn faritajn en Leysin kaj ŝi parolis pri sia belega restado en tiu vilaĝo kovrita per 1 m. da neĝo, en la svislandaj Alpoj.

LIEGA GRUPO

Post la brila kunveno de la 30a de majo dum kiu Sro Coppé regalis nin pri rakontoj el sia esperantista vivo, & diris ke, kvankam ne denaska espisto li elsuĉis la lingvon dum sia infanaĝo : ni preparis la programon por junio jene :

1an-2an-3an : BENELUKSA KONGRESO en Antverpeno.

6an : Konversacia kunveno kun magnetofonaj aŭdadoj.

13an : Komitata kunsido (bonvena ĉeesto de la membroj).

20an : Raporto pri la Antverpena Kongreso (kun filmo).

27an : Nia kursa programo.

Ĝiuj jaŭdoj je la 20horo,
« Maison des Brasseurs ».

Sabaton, la 15an je la 14h50 : Inaŭguro de Avenuo Dro Zamenhof en Anderlecht. Kunveno en la Avenuo apud « Square Frison ».

Dum la sama monato okazas la Ekzamenoj por komencantoj de la lerna sesio 1962-63. Dekkvar personoj antaŭviditaj.

Dum julio, pro libertempo, ni antaŭvidas neregulan programon kun eblaj promenadoj.

Grupa Vivo: «Paco kaj Justeco» Brugge

En la komenco de la jaro ni havis la jam tradician Kristnakofeston. Denove ĝi estis bonega kun la apogeo de la jara skizo-revuo verkita de festdirektoro André Dumarey kaj prezentita de li kaj de Gr. Maertens. En ĉiuj monatoj la programoj estis tre variaj. R. Martens gvidis, kiel kutime, la ekzercojn. Kelkaj grupanoj plendis pro la malfacileco de tiuj ekzercoj. Sed la prezidanto, en posta kunveno, akcentis ke ili estas organizataj por perfektigi en la kono de nia lingvo. Temas tie ĉi pri nuancoj en la penso kaj en la sentado kiuj devas esti tradukataj. Kaj ekzistas dua afero, nome, la diverseco de opinioj kiuj povas ekzisti pri eroj de la esperanta gramatiko, kiel tio estas la kazo por ĉiuj lingvoj, kaj pri kiuj ni libere diskutu. Ekzemplo: la afero -ata -ita. En la serio de la debatvesperoj ni havis debaton pri la utilo aŭ malutilo de la historio kaj de la klasikaj lingvoj en la instruado.

Ĉiujfoje la prezidanto enkondukis. Ni venis al pozitivaj konkludoj (io kio estas malofita !): la instruado de la his-

torio povas esti tre utila se ĝi ne estas nura enkapigo de nekoheraj faktoj, datoj kaj militoj; se ĝi montras kaŭzojn kaj efikojn kaj eĉ kelkfoje leĝojn: se ĝi montras evoluon; la adaptigon kaj adaptigon de la homoj al cirkonstancoj; la pensadon kaj sentadon de la homoj en tiuj tempoj. Rilate al la klasikaj lingvoj, la konkludo estis ke ili povas esti forigitaj el la instruado. Ni ne vidas la utilecon de tiuj gramatikoj; aliaj gramatikoj prezentas similajn ecojn. Koncerne la formigan valoron de Greka kaj Roma literaturoj, ni opinias ke pli modernaj literaturoj ne estas malpli formigaj; kaj, fine, rilate al la etoso, estas bedaŭrinde ke ni ne ekscias ion pli interesaj verkoj kiel ekz. la Hindaj, Baghavad Gita ekz.

Konferenco pri aliaj internaciaj lingvoj estas ankaŭ tre interesa. Ni jam prezentis tion. Sed evidentiĝis ke tio okazis ankaŭ tiel longa tempo ke multaj de niaj gemembroj neniam aŭdis. Do, ni refaris tion.

Ni havis ankaŭ kelkajn tre ŝatatajn cerbogiĝnastikojn i.a. unu tre specialan de R. Myny. Kaj R. Iserentant prezentis krucvortenigmojn.

En la serio de la literaturaj vesperoj, la prezidanto dediĉis du kunvenojn al H. Baupierre «Specimene» kaj al la Bulgaro I. Georgiev «Provo alfronti la vivon». (Du eldonoj de «Stafeto»). Li ankaŭ donis paroladon pri la vivo en la mezepoko kaj en la tempo de la Burgundiaj dukoj, kun diapozitivaj. Ni havis interesan filmvesperon kun sciencaj kaj turistaj filmoj.

Dum la tuta vintro ni ludis Volley-Ball kaj la someraj ludoj sur plenaera tereno jam rekomenciĝis.

Ni tutkore gratulas nian membron André Claeys kiu gajnis la literaturan premion de la provinco Okcident-Flandrujo per la kolonia romano: «Het Duistere Rijk». La Flandra televido jam intervjuis lin tiuokaze.

Ni dankas la alian grupon kiu invitis nin por ĉeesti kiam paroladis S-ro Verstraete el Antwerpen pri la unua libro kiun li legis.

Ekskurso al la vitrofabriko de Zeebrugge (tre vidinda) kiun organizis nia membrino f-ino A. Van Wezel, iĝis preskaŭ katastrofa pro lastminutaj malhelaj partoprenado. Feliĉe, la grupo de S-ro Poupeye, kiun ni invitis, savis la situacion.

SE VI PAROLAS PRI STROVI... VI PENSAS PRI
VIANDAĴEJO. SE VI PENSAS PRI VIANDAĴEJO... VI
AĈETAS ĈE

STROVI

Vlamingstraat, 48 BRUGGE

STROVI - Varoj :

GARANTIO pri

bona kvalito

kaj bona prizorgado

Telefono : pogranda komerco 34559
detala * 33408

STROVI estas unuaranga!



- ★ POR VIAJ EKSTERLANDAJ
TRANSPAGOJ
- ★ POR ŜANĜOJ EN LA PLEJ ALTA
KURZO
- ★ POR VOJAĜDEVIZOJ

Bank van Roeselare & Westvlaanderen

Sidejo : ROESELARE

Noordstraat, 38 Belgujo

38 Agentejoj kaj oficejoj en la tuta provinco de Okcidentflandrujo.

manufakturaĵo firmo DE BROUWERE

Magdalenastraat, 29, Kortrijk (Belgujo) - Tel. (056) 216.54



VIRINAJ BLUZOJ KAJ JUPOJ " MAGDELEINE "

deponita kvalitmarko
la perfekta konfekcio
fabrikita el plej bonaj svisaĵaj teksaĵoj
Haveblaj en la bonaj konfekcibutikoj



PRECIPAJ CENTROJ :

| | |
|------------|-------------------------|
| Antwerpen | : Aalmoezenierstr. 2 |
| | Abdijstr 57 |
| | Anselmostr. 17 |
| | Nationalestr. 87 |
| Arlon | : Marché-aux-Légumes 16 |
| Brugge | : Breidelstr. 8 |
| Brussel | : Galerie d'Ixelles 9 |
| | Anspachlaan 194 |
| Eupen | : Kirchstr. 14 |
| Gent | : Brabantdam 25 |
| Herstal | : Rue Large Voie 4 |
| Leuven | : Bondgenotenlaan 29 |
| Luxembourg | : Place de la Gare 67 |
| Mechelen | : Grootbrug 8 |
| Roeselare | : Ooststr. 124 |
| Tournai | : Rue Royale 75 |
| Turnhout | : Herentalsstr. 6 |
| Verviers | : Pont St. Laurent 2 |